nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2016

## DON QUIJOTE EN ESPERANTO PREZENTOTA EN INSTITUTO CERVANTES

La 15an de decembro, en la Internacia Tago de Esperanto, Hispana Esperanto-Federacio publike prezentos en la centra sidejo de la Instituto Cervantes, en Madrido, la elektronikan eldonon de la traduko al Esperanto de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha".

La evento komenciĝos je la 7a vespere en la sidejo de la Instituto en strato Alcalá, 49, Madrido (enirejo per la strato Barquillo). Ĝi estos prezentata de la direktoro de kulturo de la Instituto Cervantes, Beatriz Hernanz, kaj en ĝi partoprenos José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Miguel Gutiérrez Adúriz, verkisto en Esperanto kaj kunordiganto de la projekto de bitigo de la verko, kaj Ana Manero, respondeculo de la *Bitoteko* de HEF. Fine de la aranĝo okazos donacado de serio de libroj en Esperanto al la biblioteko de la Instituto Cervantes.

Kiel vi scias, tiu bita eldono estas disponebla en la Bitoteko de HEF, en la adreso http://www.esperanto.es/quijote.

Ni alvokas ĉiujn esperantistojn kaj subtenantojn vivantajn en Madrido aŭ proksime, akompani nin dum la prezento, kaj disvastigi la aktivaĵon inter viaj konatoj interesiĝantaj pri la monda kulturo.

## ZAMENHOF-TAGO

Ĉi-jare la esperantistoj en Madrido celebros la Zamenhof-feston per kuna vespermanĝo la ĵaŭdon 15an de decembro (tuj post la prezento en Instituto Cervantes), en restoracio Artemisa, strato Tres Cruces numero 4, metroo Gran Vía (ekzistas alia samnoma, ne konfuziĝu). La menuo estos vegetara, vidu ĝin en la retejo: http://restaurantevegetarianosolgranvia.com/menu-de-navidad

La prezo estos: 21 €, kaj la horo estos la 21:00, sen prokrasto. Por ke ili povu bone prepari ĉion estas necese diri kiom da homoj venos. Do, bonvolu anonciĝi antaú la dimanĉo 11a al la retpoŝto de la prezidanto de MEL: manolo.parra@yahoo.es

## ALIAJ KULTURAJ PREZENTADOJ




La 12-an de decembro estos prezentata en la Nacia Biblioteko de Hispanio la libro “El Quijote universal. Siglo XXI”. Ĝi entenas pli ol cent tradukojn de diversaj ĉapitroj de la verko “Don Quijote”, kelkaj el ili unuafojaj. Inter ili troviĝas, kompreneble, ankaŭ Esperanto.

Dum la prezentado oni legos pecojn de kelkaj el tiuj tradukoj. La pecon en Esperanto legos la prezidanto de HEF. La eniro estas libera, en la ĉefa prelegsalono de la Biblioteko, je la 7-a vespere, kaj ĝi estos elsendita en la retejo de la BNE.

La libro estis eldonita de la asocio “La Otra Andalucía”, la Fakultato pri Filologio de la Universitato Complutense de Madrido kaj la librejo Antonio Machado, okaze de la kunmemoroj de la 400a datreveno de la forpaso de Miguel de Cervantes.

Pliaj detaloj troveblas en: http://www.bne.es/es/Actividades/2016/12-diciembre/PresentaciondellibroElQuijoteuniversalSigloXXI.html.

Ni memorigas alian prezenton, pri kiu ni informis en la oktobra numero, kaj kiu nun troviĝas en la reto: nia amiko Pedro Zurita helpis en la organizado de evento, la 4-an de oktobro, ankaŭ en la Nacia Biblioteko, en kiu blinduloj el diversaj landoj legis pecojn en diversaj lingvoj. Pedro mem legis en la astura lingvo, kaj amikino el Serbio legis en Esperanto. Vidu la tutan prezenton en: https://youtu.be/n3D4_UyWXnI.



Kiel ni anoncis en la pasinta ekzemplero, la pasintan 15-an de novembro en la librejo "La Central" de Madrido, okazis prezentado de la revuo pri soci-kritika poezio "Caja de resistencia", kies dua numero enhavas poemon de la poeto Miguel Fernández, en la esperanta originalo kaj en hispana traduko. Dum tiu presentado Miguel Fernández deklamis du poemojn, tiun sian kaj alian de Suso Moinhos, kiu estis publikigita en la unua numero de la revuo. Li deklamis unue en la hispana kaj poste en Esperanto, kio ricevis tre pozitivajn reagojn de ĉeestantoj.

Aliflanke, en la lasta momento ne okazis la anoncita koncerto de la rok-bando Cronómetrobudú, en kiu ĝi intencis prezenti sian lastan k-diskon, kun la nomo "Esperanto", en la koncertejo Moby Dick, de Madrido. Ili anoncis ke ili provos organizi alian koncerton en venonta jaro 2017.

## MIGUEL FERNÁNDEZ, NOVA PREZIDANTO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ

Du hispanaj Esperanto-verkistoj estas la novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA. Nia samgrupano Miguel Fernández estos la prezidanto, dum la kantabriano Miguel Gutiérrez Adúriz estos la sekretario.

Pliajn detalojn kaj iliajn biografiojn vi povas legi en la gazetara komuniko de UEA: http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Novaj-gvidantoj-por-la-Belartaj-Konkursoj-de-UEA.

Gratulon al ambaŭ!

## ESTRARKUNSIDO DE MEL PRI LA STATUTO DE UEA

Kiel anoncite en la novembra numero de Nia Voĉo, la tagon 14an kunsidis la estraro de MEL kaj difinis ties sintenon pri la proponataj ŝanĝoj en la statuto de UEA. Ni voĉdonis NE al la ŝanĝo en la artikolo 17a, pri eksiĝo de membroj, kaj voĉdonis JES al ĉiuj aliaj ŝanĝo-proponoj. La voĉdonilo estas jam sendita al UEA.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30 (ankaŭ dum la "ponto", sed probable ne dum la kristnaska periodo, do demandu antaŭe se vi venos tiujn datojn)

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.